

Фёдор Сологуб,
La disipanto

tradukita de Michel Duc Goninaz

Mi la korpon liveris al ŝimo,
Disipinte trezoron de l' sort'.
Jen mi staras ĉe la noktlimo
En nudeco, senhelpa, sen fort'.

Kaj mi petas de la Dia graco
— senkomparas la preĝa sincer'! —
“Nur iomon da forto donacu
Al mi, kiun lacigas la ter'.

Sub ĉi-teraj ĉagrenoj mi sklavas,
Por mi troas la tera plenum',
Sed printempoj min, ho kiom!
ravas,
Kaj freŝigas min akva brakum'.

Kiom ruĝe aŭroroj ĉi ardas,
Kiel revas jasmena arbet',
Kiel milde lazuro rigardas,
Kiel kisas la lipa impet'!

Dezirata eĉ pli, ol kisado,
Kaj aroma eĉ pli, ol jasmen',
Estas forto de songa persvado
Kaj de versoj la milda refren'.

Ĉar Vi, Di', kompatemas, kaj vere
En Vi — gloro kaj fort',
lumoflu'.
Donu iom da vivo surtere,
Por ke kantojn komponu mi plu!"

...

Фёдор Сологуб,
La disipulo

tradukita de Manfred Retzlaff

Stulte mi eluzis korpon mi-
an,
Disipado estis tio ĉi,
Vidas elirejon mi nenian,
Nude, neŝirmite staras mi.

Kaj mi preĝas al la kara Dio,
-Tiel mi neniam petis Lin -:
“Donu Vi al mi da energio
iom, kiu plu vivtenos min.

Neportebaj afliktiĝoj teraj,
Kaj tro granda tera vivo-
pen',
Sed kontraŭe ĉarmoj prima-
veraj
Kaj freŝiga akva
ĉirkaŭpren'!

Kiel ardas la purpur-
aŭroroj,
Kiel igas revu la jasmen',
Kiel rave amas inaj koroj,
Kiel kisas lipoj kun
ĝojplen'!

Kaj ankoraŭ ĉi kساد' pasia,
1)
Kaj jasmen-aromo tiu ĉi,
La revado forta, idilia,
Kaj de l' versoj dolĉa melo-
di'!

Gloro kaj potenco estas via!
Mi Vin petas, kompatema
Di':
Donu iom al vivtempo mia,
Por ke pluaĵn kantojn verku
mi!"

...

Фёдор Сологуб,
Расточитель

Измотал я безумное тело,
Расточитель дарованных благ,
И стою у ночного предела,
Изнурен, беззащитен и наг.

И прошу я у милого Бога,
Как никто никогда не просил:
„Подари мне еще хоть немного
Для земли утомительной сил.

Огорченья земные несносны,
Непосильны земные труды,
Но зато как пленительны
весны,
Как прохладны объятья воды!

Как пылают багряные зори,
Как мечтает жасминовый куст,
Сколко ласки в лазоревом взоре
И в лобзании радостных уст!

И еще вожденней лобзанья,
Ароматней жасминных кустов
Благодатная сила мечтанья
И певучая сладость стихов.

У тебя, милосердного Бога,
Много славы, и света, и сил.
Дай мне жизни земной хоть
немного,
Чтоб я новые песни сложил!"

...

*Traduko de la Rusa poemo "Расмочитель" de ФЁДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de MICHEL DUC GONINAZ (*1933-09.06) en 2003.*

Arg-385-759 (2007-02-08 12:35:49)

Tiu ĉi traduko aperis en la revuo "La ondo de Esperanto", en 2003. Laŭ sciigo de s-ro Michel Duc Goninaz, la verkinto de tiu ĉi traduko, mi, Manfred Retzlaff, korektis preseraron en la tria stfo, nome "printempo" anstataŭ ĝuste "printempoj". S-ro Duc Goninaz atentigis min pri tio per retletero de l' 07.02.2007. Tiu preseraro ankoraŭ estis en la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36>, el kiu mi prenis la tradukon.

*Traduko de la Rusa poemo "Расмочитель" de ФЁДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-08 .*

MR-392-1a / Arg-385-758 (2007-02-06 12:17:32)

La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas ФЁДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05), publikigita 1917-06-13.*

Arg-385-757 (2007-02-06 16:46:33)

La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).